

Promenado en Lovenarenbroek

Lovenarenbroek estas eduka natura areo en la Provinca Naturparko de Kessel-Lo, proksime al la "Ekocentro" (Ekologia Centro). Iam Lovenarenbroek estis granda marĉa areo en la valo de la Dejno (Dijle), kiu etendiĝis de la 12-a-jarcenta ringo de Loveno ĝis la piedo de la Kesselberg. La loĝantoj de Loveno uzis parton de ĉi tiu areo kiel herbejo. La parceloj, kiujn *Natuurpunt* luprenas de la provinco Flandra Brabanto, konsistas el herbejo, krudaĵo, arbarbordo kaj arbaro (alna* marĉarbaro). [***Alno** (*Alnus*)(NL Els)(FR Aulne)]

La botanikan valoron reflektas la iama plantoriĉeco de ĉi tiu regiono. Kalkoriĉa grundakvo kaŭzas la aperon de maloftaj plantoj. La natura areeto ofertas interesajn edukajn perspektivojn por la vizitantoj de la Ekocentro.

- Estas mallonga promenrondo ĉirkaŭ la areo.
- Pro ĝia delikateco, la natura areo mem ne estas konstante malferma al la publiko.
- Per kvar informaj tabuloj vi ricevos informojn pri la kialo kaj signifo de ĉi tiu peco de malseka herbejo kun ĝiaj unikaj kaj specifaj plantoj kaj bestoj. Ĉe ĉiu informa tabulo troviĝas rigardejo, kie vi povas observi la evoluon de la vegetaĵaro kaj la rezultojn de la prizorgado dum la tuta jaro.

Bestoj kaj plantoj

Krom la **marĉa kalto** (Lat. *Caltha palustris*)(NL: Dotterbloem)(FR: Populage des marais, Caltha des marais, soucis d'eau), kreskas multaj aliaj interesaj kaj nuntempe relative maloftaj plantoj en la herbejo, kiel **kukolflora sileno** (*Silene flos-cuculi*)(NL Koekoeksbloem)(FR Lychnis fleur de coucou), **akva ekvizeto** (*Equisetum fluviatile* L.)(NL holpijp)(FR Prêle des eaux), **arbara skirpo** (*Scirpus sylvaticus*)(NL Bosbies)(FR Scirpe des bois), **glata kardo** (*Cirsium palustre*)(NL Kale jonker)(FR Cirse des marais), **flava irido** (*Iris pseudacorus*)(NL Gele lis)(FR iris des marais), **granda valeriano** (*Valeriana officinalis*)(NL Echte of Grote valeriaan)(FR Valériane officinale, Valériane des collines), **venena ranunkolo** (*Ranunculus sceleratus*)(NL blaartrekkende boterbloem)(FR Renoncule scélérate), **fleksita kardamino** (*Cardamine flexuosa*)(NL bosveldkers)(FR Cardamine flexueuse, Cardamine des bois), **malsekema veroniko** (*Veronica beccabunga*) (NL Beekpunge)(FR Véronique des ruisseaux, Cresson de cheval), **marĉa lotuso** (*Lotus pedunculatus*)(NL Moerasrolklaver)(FR Lotier des marais), **herbeja latiro** (*Lathyrus pratensis*) (NL veldlathyrus)(FR Gesse des prés) kaj herbejkardamino (*Cardamine pratensis*)(NL pinksterbloem)(FR **Cardamine des prés, Cresson des prés**).

Eĉ pli maloftaj estas la **marĉa junko** (*Juncus subnodulosus*)(NL paddenrus)(FR Jonc noueux) kaj la **marĉa krepido** (*Crepis paludosa*)(NL Moerasstreekzaad)(FR Crépide des marais).

Sur lokoj, kie ni malpli regule falĉas (ekzemple ĉiun duan jaron), kreskas pli krudaj plantoj kiel la **granda glicerio** (*Glyceria maxima*)(NL Liesgras)(FR Glycérie aquatique, grande glycérie), **rampa ranunkolo** (*Ranunculus repens* L)(NL kruipende boterbloem)(renoncule rampante, bouton d'or), **brasiko-cirsio** (*Cirsium oleraceum*)(NL moesdistel)(FR Cirse maraîcher), **akva mento** (*Mentha aquatica*)(NL watermunt)(FR Menthe aquatique), **ulmario** (*Filipendula ulmaria*)(NL moerasspirea)(FR Reine-des-prés), **hara epilobio**, (*Epilobium hirsutum*)(NL harig wilgenroosje)(FR épilobe à grandes fleurs), **salikario** (*Lythrum salicaria*) (NL grote kattenstaart)(FR Salicaire commune), **bruna tifeo** (*Typha latifolia*) (NL grote lisdodde)(FR Massette à feuilles larges, Roseau à massette) kaj **heĝa konvolvulo** (*Calystegia sepium*)(NL haagwinde)(FR Liseron des haies).

Sur pli sekaj partoj apud la Ekocentro troviĝas specioj de sekaj herbejoj, kiel **akra ranunkolo** (*Ranunculus acris*)(NL scherpe boterbloem)(FR Renoncule âcre), **agrimonio** (*Agrimonia*) (NL Agrimonie)(FR Aigremoine) kaj **heĝa vicio** (*Vicia sepium*) (NL heggenwikke)(FR Vesce des haies, Vesce sauvage).

Ĉe la arbarbordo kreskas **granda urtiko** (*Urtica dioica*) (NL Grote brandnetel)(FR Grande ortie), **fikario** (*Ficaria verna*) (NL speenkruid) (FR Ficaire), **oficina aliaro** (*Alliaria petiolata*)(NL look-zonder-look) (FR Alliaire officinale, Herbe à ail), **arbara stakio** (*Stachys sylvatica*)(NL bosandoorn) (FR Épiaire des bois, Ortie puante), **Robert-geranio** (*Geranium robertianum*)(NL robertskruid)(FR Géranium Herbe à Robert) kaj **glekomo** (*Glechoma hederacea*) (NL hondsdraf)(FR Lierre terrestre), sed ankaŭ pli maloftaj specioj kiel la **radia primolo** (*Primula elatior*) (NL Slanke sleutelbloem)(FR Primevère élevée, Primevère des bois). Aliaj plantoj altiras aliajn bestojn (insektojn, amfibiojn, birdojn ktp.). Tio signifas, ke la biodiverseco pliboniĝas.

Kion faras Natuurpunt

En la herbejo ni faras tion, kion la loĝantoj de Loveno montris al ni: du fojojn jare ni falĉas kaj forportas la falĉaĵojn. En la arbarbordo (kiu ĉefe konsistas el nigra alno) ni intervenas malpli ofte (hakatas ĉiujn 5 ĝis 10 jarojn). Kaj fine, la arbara parto rajtas evolui spontanee.

Dum 2008, malnova rubejo estis elfosita kaj forigita, kaj ligna vojo estis konstruita ĉirkaŭ la tuta areo, por ke vizitantoj povu esplori la areon kun sekaj piedoj. La unuaj rezultoj estas almenaŭ esperplenaj, kun amasoj da salikarioj kaj en multaj lokoj ankaŭ marĉaj junkoj. En la amfibia lageto ni tuj trovis brunajn kaj verdajn ranojn.

Fonto: <https://www.natuurpunt.be/natuurgebieden/lovenarenbroek>